

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Inĝ-ro R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I * N-RO 20

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

OKTOBRO 1933

Survoje al Konsilanta Gramatiko.

Redaktanto: Teo Jung.

Materialon por ĉi tiu rubriko oni direktu al s-ro Teo Jung, Brüsseler Strasse 94, Köln, Germ.; ĉiun ceteran materialon destinitan por „Lingva Kritiko“ al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

Gramatikaj demandoj.

61. Tempoformo.

En Heroldo (Tra la mondo) n-ro 663 mi legis: „Mortis la norvega ĉefministro Kolstad; li naskiĝis en la jaro 1878 kiel filo de agrikulturisto.“ Laŭ mi, oni devus skribi: „estis naskiĝinta“, ĉar la naskiĝo okazis antaŭ la morto, do ĝi estis antaŭtempa al la morto (-is -inta). (A. J.)

62. Kies kaj po.

Kiu el la sekvantaj frazoj estas korekta, aŭ kiuj estas korektaj? Ŝajnas al mi, ke oni povas apliki ĉiujn:

1. Domo, kies ĉiu etaĝo enhavas ses ĉambrojn.
2. Domo, kies ĉiu etaĝo enhavas po ses ĉambroj.
3. Domo, kies etaĝoj (ĉiuj) enhavas ses ĉambrojn.
4. Domo, kies etaĝoj (ĉiuj) enhavas po ses ĉambroj. (O. F.)

63. Adjektiva aŭ adverba finaĵo.

Ĉu oni diras „falinta, droninta“ aŭ „falinte, droninte“ en jena frazo: Mi ne povas nomi granda malŝelĉo esti falinta en riveron, sed esti droninta, tio estas katasstrofo. (B. K.)

64. Du demandvortoj en sama frazo.

Hungaroj kelkfoje uzas du demandvortojn en sama frazo, ekz.: Li klarigis, kiu kion devas fari; Li indikis, kies nomo sur kiu paĝo troviĝas. Ĉu tiuj frazoj ne estas malkorektaj? (M. M.)

65. Vortordo; neado.

Ĉu en la frazo „Britoj ne plu povas veni“ ne pli klara estus: „plu ne povas veni“, se ne staru ĉie antaŭ la neata vorto? (A. Z.)

66. Neklara senco.

Car mi ĉiam volas eviti dusencaĵojn, kiel ankaŭ aliaj bonaj esperantistoj, mi petas ke vi bonvolu pritrakti en „Lingva Kritiko“ la signifon logikan de la frazo „spertis menion krom ko: kta . . . traktado“ en Heroldo n-ro 34 (739) de 27. 8., paĝo 4, lasta kolono. Se oni prave uzadas la radikon, tamen almenaŭ mankas sufiĉeco por klareco. (N. W. Fr.)

67. Neado.

En la nova libro de Baghy (Verdaj Donkifotoj) troviĝas la frazo: Krome la kosto de tia maŝino ne estas du fileroj. — Tio signifas, laŭ mi, ke ĝi kosta malpli ol du

fileroj; sed la senco estas, ke ĝi kosta multe pli. Via opinio? (M. W.)

68. Centjaro — jarcento.

„Centjaro“ ni kantas en „Nova kanto“ de A. Dombrovski. Ĝi signifas nur unu centan jaron. Jarcento = cent jaroj. Ĉu ne? (A. Z.)

69. Prepozicio: je.

Antaŭ nelonge mi legis je la frazon: „La kotizo, ĝis nun 15 markoj, estas reduktita je 7 markoj“. Kiel mi devas kompreni tion? Ĉu la kotizo, post la redukto, estas nur 7 markoj, aŭ ĉu la redukto estas 7 markoj kaj la nova kotizo 8 markoj? (R.)

70. Prepozicio „da“ aŭ akuzativo.

Kiu el la sekvantaj frazoj estas korekta (temas pri titolo por artikolo), ĉu: 300 jaroj da lingvo internacia, ĉu: 300 jarojn lingvo internacia, ĉu: Lingvo internacia de post 300 jaroj? (R.)

Respondoj.

54. Jus (ĝuste, rekte).

La respondo de Sch. pri „jus“ ne estas kontentiga. Ne konsiderante ke „koincide“ neniel estas pli bona ol la nomita „samtempe“, la demando ne temas pri tio. Evidente mi volis nur scii, ĉu en la nomita frazo „jus“ estas tute taŭga, aŭ „ĝuste“, aŭ „rekte“. Laŭ mia nuna opinio, la vorto, kiu ĝuste trafas la de mi volitan sencan, estas „senpere“. Do: Oni donis la medikamenton senpere antaŭ la atako de 1^o febro. (B. K.)

Korekto: Bonvolu en la redakcia rimarko post la respondo de s-ro Sch. en la juna numero, 4-a linio, anstataŭigi „rakontis“ per „renkontis“!

56. Adverbo.

Respondon al tiu demando sendis ankoraŭ s-ano H. N.; sed lia respondo ĝenerale ne alportas ion novan sed konfirmas la respondon jam donitan. Pri la 2-a punkto de la demando, s-ano H. N. prave skribas ke, uzante la adjektivan „fatala“, oni devas finiĝi la frazon per ĝi: La sceno finiĝu fatala.

61. Tempoformo.

Kvankam vi estas prava, tamen tia hiperlogikeco ne estas necesa. Ĉiu leganto ja scias, ke naskiĝo okazis antaŭ morto. Krom tio, la aldono de la januaro 1878 prezentas sufiĉegan klarigon.

62. Kies kaj po.

Efektive, ĉiuj kvar frazoj estas korektaj. Tio ja okazas tre ofte en Esperanto, ke oni havas diversajn korektajn esprimebilojn:

certa trankviligo por uzantoj de la internacia lingvo, precipe por komencantoj!

63. Adjektiva aŭ adverba finaĵo.

Korekta estas la adjektiva finaĵo. Oni elkonas tion, anstataŭigante la participojn per veraj adjektivoj: „Mi ne povas nomi granda malŝelĉo esti malbela (ne: malbele), sed esti malsana (ne: malsane) tio estas katasstrofo.“ Ne temas pri nepersona esprimo (ekz.: estas malbele ke . . . , estas dirate ke . . .) sed pri stato.

64. Du demandvortoj en sama frazo.

Ni ne scias, ĉu oni povas nomi tiujn frazojn malkorektaj; sed certe estas preferinde, eviti ilin. Do, oni skribu pli bone: Li klarigis, kion ĉiu devas fari; Li indikis, kies nomo troviĝas en la libro kaj sur kiu paĝo (ĝi troviĝas).

65. Vortordo; neado.

Tute ne. Neata estas ĝuste la vorteto plu. Se ni metus plu antaŭ ne, tio logike devus signifi ke ĝis nun ili ne povis veni, kaj ke ankaŭ estonte (= plu) ili ne povos veni.

66. Neklara senco.

Ni ne komprenas, kio al s-ro N. W. Fr. ne estas klara. „Niaj kongresanoj spertis menion krom korekta . . . traktado“ signifas ke ili spertis nur korektan ktp. traktadon, sed nenion ceteran, do menion malbonan.

67. Neado.

La logika senco de la citita frazo estas, ke la kosto de la maŝino estas alia ol du fileroj — do ĝi povas esti pli alta aŭ pli malalta. Tamen kutime oni komprenas la lastan eblecon. Sekve, estas rekomendinde, en la unua kazo skribi: La kosto de la maŝino estas ne nur du fileroj, — kaj en la dua kazo: La kosto de la maŝino estas eĉ ne du fileroj.

68. Centjaro — jarcento.

Jam ofte oni diskutis pri tiuj formoj, simile: miljaro — jarmilo. Kompreneble, vi estas prava. Tute logike oni devus ankaŭ diri jarkvarono anstataŭ kvaronjaro, jarduono anst. duonjaro; sed jen la kutimo estas pli forta ol la nepra logiko, kaj krome dusenceco ne estas timenda, — sekve ambaŭ formoj estas permeseblaj.

69. Prepozicio: je.

La dubo de s-ano R. estas ne senbaza. Ni preferas la duan sencan: „La kotizo, ĝis nun 15 markoj, estas reduktita je 7 markoj (al [aŭ: ĝis] 8 markoj)“. Alia frazo: „La akvonivelo de la rivero, kiu dum la inundo havis altecon de 7 metroj, nun falis je 3 metroj al (ĝis) 4 metroj“.

70. Prepozicio „da“ aŭ akuzativo.

Ĉiuj tri frazoj ŝajnas esti permeseblaj. Ni preferas la duan. La tria cetere enhavas logikan eraron: de post 300 jaroj = de post 2233; logike korekta estus: de antaŭ (aŭ simple: de) 300 jaroj.

La konstruo de la lingva sistemo.

De J. Penndorf, Plauen, Germanujo.

Universala helplingvo, taŭga por la praktiko, laŭ Zamenhof estu — pro simpla gramatiko kaj plejble internacia (prefere romana-germana) vortmaterialo — por ĉiuj facile lernebla kaj komprenbla, cetere belsona. Ĝenerale li imitis la sistemon de la latina, la simplecon de la angla gramatiko, krome la volkalan sonriĉecon de la itala lingvo, kontraŭe al la abundo je konsonantoj en la slavaj idiomoj (ekz. Tomsk, Plzen). Estas interese studadi, el kiuj fundamenteroj li aranĝis sian lingvan konstruaĵon.

Unue li diferencigis per **finaj**oj simple **vokalaj** la ĉefajn vortklasojn, elektante -a por la adjektivoj, -o por la substantivoj, -e por la adverboj, -i por la verboj. Do estiĝas ekz. „alta fago“ = (in) alta fago (latine), komparu ankaŭ grekan frazeron „hiera biblio-s“; „juste“ estas identa al la sansenca latina adverbulo. Plue la verbformoj „aŭdi, dormi, puni“ devenas de la respondaj latinaj infinitivoj „audire, dormire, punire“ sen la finsilabo re (ja bezonata kiel prefikso). La finaĵo -u de la ordona modo ne estas prunte prenita, sed elpensita laŭ la vokale finiĝantaj tipoj de latina imperativo: „lauda, mone, audi.“

Cetere oni priatentu, ke -u funkcias (kvankam malofte) ankaŭ kiel pronoma finaĵo (iu, kiu, tiu, ĉiu, niu — unu), same -i karakterizas ĉiujn pronomajn formojn (mi, ci, li, ŝi, ĝi, si, ni, vi, ili, oni; i-, ki-, ti-, ĉi-, ni-).

Krome ekzistas la **neŭtrala**, sed difinita finaĵo -aŭ, kiu nur malfrue naskiĝis kaj laŭ la vortoj de la majstro¹⁾ „kredeble neniam enfalus en lian kapon teorie“. Troviĝas en „Universala Vortaro“ (UV) jenaj dudek ekzemploj:

1. aŭ, maŭ, ambaŭ;
2. anstataŭ, antaŭ, ĉirkaŭ, kontraŭ, laŭ, malgraŭ;
3. adiaŭ, almenaŭ, ankaŭ, ankoraŭ, apenaŭ, baldaŭ, hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ, kvazaŭ, preskaŭ.

Ni esploru ilin pli detale!

1. „aŭ“ = f(ranca), „ou“ (prononcu u!). i(itala), „o“, a(ngla), „or“: la nura „o“ aŭ „u“ kiel memstara vorto ne ŝajnis praktika. do la aŭtoro preferis la diftongon „aŭ“ sufiĉe gravan kaj sonoratan.

„naŭ“ = l(atina) novem, i. nove. f. neuf, g(enmana) neun, a. nine: ĉiuj formoj komenciĝas per la litero n, sed la postaj vokaloj tre varias, do Zamenhof preferis la neŭtralan diftongon aŭ, same en la numeralo „ambaŭ“ = l. „ambo“: sed la finaĵo -o ja ne estas allas-ebla (ĉar „ambaŭ“ ĉiam estas du!), cetere la vorto estas uzata substantive,

¹⁾ Laŭ letero al Borovko, presita ekz. en „L. L. Zamenhof, Originala Verkaro“ (ZOV) p. 421.

adjektive, adverbe; krome la numeraloj principe estas senfinaĵaj; do restas la radikilo „amb“, aliĝas ĝa neŭtrala „aŭ“.

2. Pri la **prepozicio** „laŭ“ mi longtempe cerbumadis. Hazarde mi trovis en „Esperanto-Deutsches Handwörterbuch“ de K. Minor p. 5 „à la“ = laŭ. En la subnoto¹⁾ li citas el la „Fundamenta Krestomatio“ (FK) p. 155 la frazon „la nigraj haroj frizitaj à la Titus“. La tradukinto de la koncernata rakonto — cetere ne Zamenhof mem!, komparu ankaŭ ZOV p. 557! — ja certe povis skribi „laŭ Titus“. Evidentiĝas, ke la majstro la francan esprimon tre kutiman „à la“ — aŭ eble la germanan „laut“, ekz. „laut Verordnung“ — anstataŭigis feliĉe per la formo „laŭ“ kun la neŭtrala finaĵo „aŭ“ por ĝin diferencigi de la artikolo „la“.

En la latina lingvo li trovis la paron de malaj prepozicioj lokaj: „ante“ kaj „post“. La dua plaĉis al li, sed „ante“ enhavas la adverbajn finaĵojn -e, ne taŭgan por simpla prepozicio; forstrelku tiun vokalon, sed — ho vel! — naskiĝas „ant“, sufikso de aktiva participo, do ne uzebla. Aliflanke la (ankaŭ nuntempe ne kutiman) surrogato „malpost“ la aŭtoro malaprobis, prefere li kreis „antaŭ“ kun la neŭtrala finaĵo -aŭ.

Same li tiun almetis al

ĉirkaŭ = l. circa, circum: -a, -um — ne taŭgaj;
kontraŭ = l. contra (kvankam ekzistas „ekster“ = extra — inter, preter, super);
malgraŭ = f. malgré (eventuale: „malger“!);
anstataŭ = g. anstatt (eventuale: sen finaĵo kiel „apud“).

3. Restas la grupo de la **adverboj** finiĝantaj per -aŭ. Certe, ankaŭ estas identa al la itala „anche“ (finaĵo -e!); same „ankoraŭ, apenaŭ, preskaŭ“ al francaj „encore, à peine, presque“; „hieraŭ“ al „hier“ f. „Almenaŭ“, transformita el franca „au moins“, „adiaŭ“ (g. „ade“), povus ricevi la finaĵojn -e; same la latindevenaj „hodiaŭ“ (= hodie), „kvazaŭ“ (= quasi) kaj la germandevenaj „baldaŭ“ (= bald[e]), „morgaŭ“ (= morgen). Sed ŝajnas, ke Zamenhof volis rezervi la finaĵojn -e por la adverboj derivitaj de adjektivoj; ekz. troviĝas en UV la radikilo „parker-“ = f. „par coeur“; do ni supozu „parker-a“; same „volont-“ = f. volontiers, do: volont-a.

Cetere — laŭ A. Behrendt en „Esperanto-Praktiko“ 1928, p. 105 — „la Akademio Esperantista jam antaŭ multaj jaroj konsentis, ke anstataŭ la vortoj je -aŭ en adverboj oni rajtas uzi formojn je -e, sekve: almena, preske, hodie, morgo, hiero“ ktp.; sed oni konsideru ilin kiel derivitajn adverbojn de adjektivoj, almena, preska, hodia, morga, hiera“ ktp. En la lingvan praktikon

tiuj ĉi permesitaj formoj ankoraŭ ne eniris.“

Fakte la silabo -aŭ ne estas finaĵo, en la sama senco kiel a, o, e, i; plivere ĝi apartenas al la radikilo de l' vorto, do ĝi restas ankaŭ tiuokaze, se aliĝas aliaj vortelementoj. En UV Zamenhof citas jenajn prepoziciajn kunmetaĵojn: anstataŭi, antaŭtulk-, ĉirkaŭaj-, ĉirkaŭi, ĉirkaŭo, ĉirkaŭman-, ĉirkaŭpren-, ĉirkaŭskrib-, kontraŭe. Certe tiaj kunmetaĵoj certe ŝajnas iom tro pezeaj kaj malgraciaj, sekve reformemuloj kontraŭbatalis tiun finsilabon, kaj la majstro mem vole-nevole en 1892 proponis (ZOV p. 148/9) „la forigon de la „aŭ“, aŭi“ k. c.“ „Anstataŭ la finaĵo -aŭ en diversaj vortoj oni povas uzi apostrofon; ekz. „adi“ (legu: „adi“) anstataŭ „adiaŭ“, „adi“ anstataŭ „adiaŭa“. Ankaŭ tio ĉi levas la homonecon, ne enkondukante ian konfuzon (ĉar -aŭ ne apartenas al la radikilo, sed estas nur kondiĉa finiĝo, tiel same facile forlas-ebla, kiel -o en la substantivo).“

Ĉi tiu koncesio enhavas nur rimedaĵon por izolita kazo. Kvankam plimulto da voĉoj estis por tia ŝanĝo, tamen (ZOV p. 153) la aŭtoro decidis „ke la voĉoj kontraŭ estas ne tiel signifikaj, por ke ni povu lasi ilin sen atento“; tial li volonte ĝin rezignis. Sendube li ŝatis tiun sonoratan diftongon aŭ; li ja intence celis variecon en vortoj. Ĉar ne estas verŝajne, ke (krom la jam ekzistantaj 20 radikoj, finiĝantaj je -aŭ) oni kreos multon da novaj vortoj similaj, tiu (eble ne nepre necesa) finsilabo montriĝas agrabla, diferenciga variaĵo. —

Kvankam la slavaj (rusa, pola) lingvoj same kiel la latina tute malhavas artikolon, tamen Zamenhof pro la bezono de la okcident-eŭropaj lingvoj kreis (laŭ la modelo de la greka) almenaŭ difinan artikolon (Fundamenta gramatiko FG regulo 1), elektante el la latinidaj idiomoj la formon „la“; ĉar ĝi estas kvazaŭ adjektiva atributo al substantivo. Cetere laŭ Fundamenta ekzercaro FE § 27 „La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekz. rusoj aŭ poloj), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa.“

La pluralo de la substantivoj kaj adjektivoj (ekz. sanktaj libroj) pro la almetita -j estiĝas grekan tipon (ekz. hieraj bibloj); same la litero -n kiel signo de l' akuzativo devenas el la greka lingvo (hieram biblon) aŭ germana (ekz. den Boten). La aliajn kazojn de vera deklinacio anstataŭas (laŭ la analiza karaktero de la modernaj lingvoj) prepozicioj: de, al, per k. a.

La verbformoj estas treege simpligitaj. Laŭ la modelo de l' angla frazo „she learns“ = „ŝi lernas“, Zamenhof

elektis la literon s kun antaŭiranta vokalo kaj kreis, por difini tempojn kaj modojn, la finaĵojn -as, -is, -os, -us. La regula ŝanĝo de l' vokalo memorigas pri la sama kutimo de multaj naturaj lingvoj koncerne la tiel nomatajn 'fortajn verbojn', ekz. el la greka lingvo; tekto, e-tek-on, te-toka', el la latina: ago — egi, tego — toga', el la itala: vedo — vidi, fondo — fusi', el la germana: helfe, half, geholfen — binde, band, gebunden', el la angla: come — came, drink — drank — drunk'. La participoj de l' estanta tempo kongruas kun latinaj formoj, ekz. laudant-, laudat-. Ekzistas simplaj verbformoj kaj malsimplaj (per helpo de l' verbo 'esti'), konforme al la sinteza aŭ analiza lingva metodo.

La komparativon karakterizas (laŭ la ĝenerala kutimo de multaj modernaj lingvoj) la antaŭmetita vorteto 'pli', ekz. 'pli bela' (certe la franca, origine latina 'plus', itala 'più' — krome ja ekzistas en Esperanto ankaŭ la vorto 'plu', ekz. 'kaj tiel plu'), la superlativon la simila elpensita vorteto 'plej', ekz. 'plej bela' — analoge al la anglaj antaŭmetitaj 'more' — 'most'. La latinidaj lingvoj kontraŭe, por esprimi plej altan gradon, ĝenerale kontentiĝas je la artikolo antaŭ la komparativo, ekz. f. le plus grand, i. il, la più grande. La partiklo 'ol' post la komparativo memorigas pri la responda germana 'als'. Kvankam sen fina s kaj kun ŝanĝita vokalo, ĉar 'al' estas sufikso **pronomo**.

Tiuj apartaj finelementoj de la 'tabelaj vortoj' estas -es (germane 'des, wes'), -el, -al, -am, -om. Plue la numeralaj sufiksoj: -obl- (ekz. duobla = fr. double, g. doppelt), -on-, -op-: la du lastaj ŝajnas elpensitaj laŭ analogio. La memstara vorteto 'po' antaŭmetita (ĉu adverbo, ĉu prepozicio?), samsenca kun la germana 'je', devenas el la slavaj lingvoj.

Restas la ĉefaj prefiksoj kaj sufiksoj, kies gravecon Zamenhof frutempe ekkonis kaj kiujn li nun aplikis konscie kaj laŭsisteme, do bonstrukcese. Kvankam li poste „devis forĵeti kelkajn nebezonaĵajn sufiksojn“ (ZOV p. 421), tamen li elektis sufiĉe grandan nombron kaj preferis silabojn plejeble mallongajn, facile parolotablajn, bone alflekseblajn. Ekz. li ĉerpis:

I. prefiksojn el la lingvoj

latina:

- re- (reportare = reporti, revenire = reveni),
- dis- (discurrere = diskuri),
- eks- = 'ex' en la senco de 'el' (exire = eliri), en la modernaj lingvoj en la senco de 'ĉiam' (ekministaro),
- ek-: dube-origina, eble² de la itala ekkrio 'ecco!' = l. 'ecce' = E. 'jen!';

franca:

- mal- (malheureux = malfeliĉa),

²) Laŭ Göhl, Ausf. Sprachlehre des Esperanto, 1932, § 20.

- bo- (beau-père = bopatro),
- fi- (fi donc! = a. fie = g. pfui!);

germana:

- ge- (Geschwister = frato + fratino: g. Schwester);

slavaj:

- pra- (similaj: l. prae-, f. pré-, a. pre-).

II. sufiksojn el la lingvoj

greka:

- id- (Kron id es; f. Napoléonide),

latina:

- an- (Romanus = Romano),
- ar- (ammarium: arbaro, pomarium: pomaro),
- ig- (mitigare, pur[i]gare = g. reinigen);

latinidaj:

- ist- (i. artista, f. artiste, a. artist = artisto),
- il- (i. fucile, f. fusil = pafilo; grek-lat. automobile);

itala:

- ec- (grandezza = grandeco),
- estr- (maestro, navalestro = ŝip-estro),
- et- (libretto = libreto; f. opérette),
- aĉ- (terracia = teraĉo; pagliaccio);

franca:

- ad- (canonnade, promenade = promenado),
- aj- (bagage, équipage: ekipaĵo),
- em- (aimer: babiléma = qui aime [à] babiller),
- ul- (crédite, adjectifs kaj substantive uzata, devenanta de l. 'credulus' = kredulo);

angla:

- ebl- (able, possible, i. [i.] possible);

germana:

- in- (Königin = l. regina = reĝino),
- ej- (Bäckerei = bakejo),
- um- (kolumo = kio estas ĉirkaŭ [g. 'um'] la kolo);

slavaj:

- ĉj-, -mj-.

Dube-devena estas -ind-; el la en UV aldonita ekzemplo mi konjektas, ke laŭdinda' estas identa al la latina 'laudandus', kiu vortformo povas signifii iun, kiu meritas laŭdon; same 'admirinda' egallas la latinan (gerundivan adjektivon) 'admirandus'. Cetere la ne jam oficialigita sufikso -end- havas la saman devenon, ekz. 'libro (nepre) legenda' = l. 'liber legendus'.

La sufikso -uj- estas parenca al -ej-. Laŭ FE § 40 „Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, estas cigarejo; skatoloto aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo“. En la lasta senco oni diras france 'étui à cigares', germane 'Zigarrenetui'; do Göhl (§ 64) supozas, ke -uj- deriviĝas de 'étui', sed mi preferas opinias, ke Zamenhof elpensis la sufikson -uj- analoge al -ej-. Cetere -ujo ĉirkaŭfermas objekton de ĉiuj flankoj, -ingo nur parte. FE § 40: „Tubeto, en kiu oni metas cigaron,

kiam oni ĝin fumus, estas cigaringo“. Göhl (§ 62) komparas la germanan esprimon 'Fingerling', tio estas kvazaŭ parto de ganto, en kiu oni metas fingron malsaman, por ĝin ŝirmi. Ankaŭ la 'ringo' estas objekto, en kiu — laŭ la difino de Zamenhof en UV — oni ion (nome la fingron) enmetas aŭ enŝovas; komparu fingro-ringon: fingr-ingon! — Eble laŭ tiaj vortoj li elektovis la sufikson -ing-.

Sendube li mem elpensis, t. e. formis laŭ analogio jenajn sufiksojn:

- ig- konforme al -ig-: Mi varmigas akvon; la akvo varmigas;
- er- kontraŭas al -ar-: ĉar -ar- kunigas multajn samspecajn objektojn al unu, ekz. arboj — arbaro; -er- disigas unuecan komprenadon en ĝiajn elementojn, ekz. sablo — sableroj;
- eg- plifortigas la ideon, ekz. bel-ega;
- et- kontraŭe plimalfortigas ĝin, ekz. bel-eta; laŭ mia opinio ja estas tute neeble, derivi la sufikson -eg- el la greka vorto 'mega' = granda, potenca, ega (Moebusz, Universala Esperanta Lernolibro, 1926; II p. 13).

Jam mi sufiĉe ekkonis la metodon de la aŭtoro, koncerne la konstruon de lia lingva sistemo. Li plenumas la necesajn postulojn de sinteza kaj analiza gramatiko; ekz. la sufiksoj, eĉ „la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj“ (FG regulo 11). La taŭgajn fundamentojn li ĉerpis grandparte el la naturaj lingvoj, sed parte kompletigis el sia propra spirito, tamen ne arbitre elpensis, sed kreis laŭ certa principo, nome la analogio. Ĉi tiu maniero ne estas mallaudinda; ĉar li ne arogis por si iun privilegion, sed imitis kvazaŭ naturan leĝon de ĉiuj lingvoj vivantaj, tre influan kaj ĉiutempe efikan.

Fine ni resumu laŭalfabete la elementojn de la lingva sistemo, kiujn ni konstatis:

- a, -aĉ-, -ad-, -aj-, -al, -am, -an-, -ant-, -ar-, -as, -at-;
- bo-; -ĉj-; dis-;
- e, -ebl-, -ec-, -eg-, -ej-, ek-, eks-, -el, -em-, -end-, -er-, -es, -estr-, -et-;
- fi-; ge-;
- i, -id-, -ig-, -iĝ-, -il-, -in-, -ind-, -ing-, -int-, -is, -ist-, -it-;
- j; mal-; -n, -mj-;
- o, -obl-, (ol), -om, -on-, -ont-, -op-, -os, -ot-;
- pra-, (pli, plej, po); re-;
- u, -uj-, -ul-, -um-, -us.

Eldonejoj

de novaj Esperanto-gramatikoj, vortaroj kaj similaj libroj pri lingvaj, dezirantaj specialan kritikon pri tiuj libroj en „Lingva Kritiko“, estas petataj sendi po unu ekzemplero al la ĉefredaktoro s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

Ni atentigas speciale, ke temas ne pri recenzoj, sed pri serioza kritiko de libroj pri lingvaj, do ne de verkoj beletristikaj k. sim.

Sciencaj verkoj en Esperanto.

Pensoj al mia traduko de la artikolo pri klakŝtonoj en Heroldo n-ro 41 (746).

Pli bone, skribi sciencan verkon en Esperanto kun multaj vortoj el latina, greka aŭ alia glaciŝranka lingvo ol skribi nenion, sed tamen tiu verkotio povas esti nur surogato laŭ lingva vidpunkto, ĉar:

Ĉiu lingvo ne nur en sia tutajo, sed same ankaŭ en siaj partoj, siaj vortoj, nur tiam tuto plenumas sian taskon kiel intersanĝilo de pensoj kaj sentoj, se ĝi estas komprenata de ĉiuj lingvanoj. Lingvo ne estu aro da esprimotieloj, kies ĉiu estas komprenata nur de pli aŭ malpli granda nombro, sed ĝi estu en ĉiuj partoj interkomprenilo por ĉiuj siaj anoj.

Se oni bezonas novan esprimon, oni ĉerpu ĝin el la al ĉiuj konata lingvotrezoro, aŭ se tio ne estas ebla, oni pensu, ke la nova vorto eniru la esprimaron de la tuta lingvano, t. e. oni elektu almenaŭ tian novvorton, kies eniĝo ne estas malkonsilinda. Se nek la unua nek la dua okazas, tiam la nova esprimo estas por la ĝenerala lingvo senvalora, ja povas fariĝi eĉ malutila, ĉar per ĉiu nova tia esprimo kreskas la danĝero, ke de la komuna lingvo de l' tuta lingvano dissplitiĝas partoj, kiuj ĉiam post ĉiam fariĝos fremdaj kaj nekomprenablaj por la plej granda parto de la lingvanoj. Tiu nekompreno povas atingi eĉ tian gradon, ke legante artikolon en tia dissplitiĝinta esprimotielo oni same devas uzi vortaron, kvazaŭ oni legus fremdlingvan tekston.

La ĉefa danĝero tiurilate minacas flanke de l' fakesprimoj sciencaj, kaj la sekvo estas, ke la plej multaj homoj ne legas tiajn artikolojn simple pro tio, ke ili ne komprenas multajn vortojn. La fakto, ke ekzistas sciencaj verkoj, kiujn komprenas ĉiu kaj aliaj, kiujn komprenas nur fakuloj, havas siajn kaŭzojn almenaŭ parte en la supre nomita evoluo, disa evoluo, kiu certe ne estas ĝojiga.

Tiuj priprenoj instigis min anstataŭigi en mia traduko, se eble, la latin-grekajn fakesprimojn per nuraj Esperanto-vortoj. Krome oni devas diri, ke multaj sciencaj vortoj estas preskaŭ fuŝkonstruaĵoj laŭ la tasko de la lingvo.

Ekz.: „diluvio“ estas nomo de speciala epoko de l' terevoluo, kvankam ĝi signifas laŭvorte (el latino „diluviun“) nur „superakvego“, kaj kvankam dum aliaj terepokoj ankaŭ estis same grandaj superakvegoj, ekz. dum la tempego jurasa, kreta k. a. Do, la vorto „diluviun“ ne estas bonkvalita esprimo por sia enhavo. Kial do uzi en Esperanto la ĝeneralan vorton „diluvio“ (superakvego) por tute speciala superakvega epoko kaj ne preni alian esprimon kiu pli preciza laŭvorte enhavo? Sajnas al mi, ke la vorto „glaciegotempo“ estas pli taŭga: 1. ĝi pli multe rakontas pri tiu terepoko; 2. ĝi estas komprenbla eĉ al ĉiu Esperanto-ĉifano kaj 3. ĝi vivas en la suntera, ĉiutaga lingvotrezoro, kontraŭe „diluvio“ englaciĝis en la stratosfera esprimotielo de speciala scienca fakto.

Aŭ alia „konglomerato“ (kon = kun, glomero = mi buligas do: konglomerato = kunbuligaĵo. Nu bone, sed bedaŭrinde ĝi eĉ per neniu ero diras, ke ĝi temas pri aro da ruliĝintaj ŝtonoj. Buloj el tero, neĝo, argilo, eĉ el akro aĵ ŝtonsplitoj estas, kvankam ankaŭ kunbuligaĵoj, tamen ne „konglomeratoj“. Do ankaŭ tiu vorto estas laŭ enhavo fuŝkonstruo. Mi uzis anstataŭe „rulŝtonar-bulo“, kaj ĉiu infano povas tuj ek-

koni, ke temas pri bulo el aro da rulŝtonoj. Per tiu vortdisigo la lajko havas nun klaran bildon sen necese lerni novan vorton, kiun li alie ja ne povus apliki, kaj li komprenos pli facile ankaŭ la alian tekston. Por la kontraŭajo de tiu fakesprimo — la el itala lingvo prenita vorto „breĉio“ — mi preferas „splitar-bulo“. La vorto „breĉio“ nur parolas pri „splitoj“, sed ne malkaŝas, ke ili estas kunbuligitaj. Krome, komparante „breĉio“ kun „konglomerato“, oni por la signifo nenion esencan povas ekkoni. Sed legante „rulŝtonar-bulo“ kaj „splitar-bulo“, oni tuj rimarkas, ke nur la unua vortajo enhavas la radikon „ŝton-“, sed ne la dua, kaj ankaŭ tio estas helpilo, ĉar ĝi memorigas, ke splitar-buloj ne nur konsistas el ŝtonoj sed kelkfoje ankaŭ el alia materialo, ekz. osto- aŭ lignosplitoj. Plue, ankaŭ „breĉio“ estus nova vorto, kaj pri ĝi same kiel pri „konglomerato“ valoras la supre dirita, ke nova vorto aŭ devas eniri ĝeneralan lingvouzon, aŭ restos superflua ŝarĝo kaj tial fariĝos mallutila.

La transpreno de fakesprimoj latin-grekaj en ĝeneralan lingvouzon estas ofte ne nur ne konsilinda (a), sed eĉ kelkfoje ne ebla (b), ja krome ekzistas vortajoj, kiuj transprenite en Esperanton ridigus (c). Ekz.: a) ne estas konsilinde enkonduki krom nia „kun“ la vorton „kon“, aŭ paralele kun la Esperanto vortajo „buligi“ uzi la ellatinan „glomeri“; b) Ne eble estas uzi la vorton „krio“ (el greka) = „glacio“, ĉar „krio“ ja signifas en Esperanto ion alian. Aliajn ekzemplojn al (a) kaj (b) oni povas trovi multnombro. Finfine (c), se ni transprenas en Esperanton la vorton „krikokrotalito“ anstataŭ glacioklakŝtono, oni tuj vidas, ke tiu formajo estas ridinda, aŭ oni devas per popola vortesplozo ĝin klarigi tiel, ke „klakŝtono estas tia kruta lito, ke oni kuŝante en ĝi krietas“. Sed tiaj ŝerklarigoj certe neniel helpas. Glacioklakŝtono kontraŭe tuj anoncas, ke temas pri ŝtono rilatanta iel al klaki kaj glacio. Same la vorto „krotalo“ estas evitinda, „sonserpento“ certe taŭgas pli bone.

Ke la scienculo en la antaŭ-Esperanto-tempo estis devigata, por la internacia interkompreno uzi latinajn aŭ grekajn vortojn, tio estas tute klara, kvankam oni ofte estus povinta elekti pli esprimriĉajn vortojn. Tamen ankaŭ tio estas komprenbla, ĉar la plej multaj el la esploruloj estas specialistoj en sia fakto kaj ne krome ankaŭ lingvistoj. Sed ni esperantistoj nepre devas esti ankaŭ lingvonformantoj. Ni ne transprenu senkritike la latin-grekajn vortojn en nian karan lingvon. Ofte pli helpas traduko en ĝin, sed povas ankaŭ esti, ke ni povas formi pli precizan kaj esprimriĉan vortajon ol la „klasika“ estas. Tiam kurage antaŭen! Ni havigos al nia movado tiel sciencajn verkojn, kiuj estos pli facile komprenblaj ol la naŭlingvaj kaj per tio la disvastigado de la sciencaj scioj nur povas profiti.

*) Certe ekzistas en Esperanto multaj vortoj komencantaj per „kon“, sed la parenceco de tiu „kon“ kun nia „kun“ estas aŭ neniel aŭ nur tre malforte sentebla. Komparu: konsenti — konsenti konspiri — kunspiri kontenta — kontenti konstrui — kunkonstrui aŭ (com = con en lat. lingvo): kompensi — kunpensi kompreni — kunpreni k. a.

Generale oni uzas en Esperanto la „kun“-vortojn duvorte. (Ĉe „konstrui“ ni vidas, ke ĝi havas la saman parton „-strui“ kiel „instrui“, vortparton, kiu la latino konas, sed en la vorthavo de Esperanto ĝi ne ekzistas, kaj tial parenceco inter ambaŭ vortoj estas por ni kvankam videbla tamen ne komprenbla. Ni uzas ĝin kiel du neparencajn vortojn.) Tute alie ĉe „konglomerato“, ni tuj ekkonas, klarigante la vorton, la kunmetiĝon kaj egalsignifigas la latinan „kon“ kun nia Esperanta „kun“.

Grado de verba forto en „-anto“ kaj „-ado“.

„-anto“.

En la substantiva participo la sento de aktiva ago donata de la „-ant-“ foje ŝajnas al la skribanto tiel frapante granda, ke li volis uzi adverbajn modifojn anstataŭ adjektiva. Ekzemple, „rapida faranto“ signifas „la rapida persono kiu faras“, sed „rapide faranto“ signifas „tiu, kiu estas rapide faranta“, diferenca nuanco.

Al la skribanto la verba forto de la substantiva participo ŝajnas sufiĉa por justigi la uzon, ne nur de adverba modifajo, sed eĉ de rekta objekto (Zamenhof sur p. 329, l. 7 de F. K. almenaŭ ŝajne uzis ĉi tiun lastan malgraŭ teoria kontraŭajo esprimita en Lingvaj Respondoj, sed eble tio estis nur okazo de subkomprenata prepozicio.) Sed ĉu tia uzo estus rigardata kiel eraro aŭ malbonaĵo (eble eĉ ŝajna uzo kiel tiu de D-ro Zamenhof) flanke de la esperantistaro? Jen la demando.

„-ado“.

Simile denove pri „-ado“. Kiel ordinare uzata, ĉi tiu finiĝo ŝajne donas al verbo la signifon de verba-substantivo nur en la pli malgranda senco de la termino, tiu de nura nomo de ago, sen efektiva verba forto. Sed Esperanto efektive tre bezonas efektivan gerundion; la uzo de la formo „-ado“ por doni tian plibelugis kaj pliriĉigis la lingvon, ankaŭ ĝi farus plimallongaj certajn esprimojn. „Per farado tion“ estas kaj pli konciza kaj pli bela, ol „per la farado de tio“; tre certe ĝi estus bonvena alternativo (ne ĉiam anstataŭanto.) Fakte Zamenhof ĉiam sentis tion, ĉar li uzis foje „Tre grava (rimedo) estas diligenta uzado ĝin“, kaj simile „fermado ĝin“ (F. K. p. 199, l. 13). Komprenoble neniu povus kritiki tian esprimon, ĉar ĝi povas ĉiam esti pravigata sub la rubriko de subkompreniĝo de „je“ aŭ alia prepozicio. Sed, ĉu ne estus bone pliriĉigi la repertuaron de Esperanta stilo per senkondiĉa permeso, uzi la akuzativon post „-ado“ kiel transitiva signifo, kaj la nominativon post „-ado“ uzata kun la senco de predikata verbo (atributa komplemento de la kvazaŭa gerundio — „per la ŝajnda tia“, ekz.)? Tiam eble estus ankaŭ permesible uzi laŭbezone adverbajn modifojn, ĉar la verba forto en la gerundio plene tion pravigus. Kion aliaj esperantistoj pensas pri tio?

Komence Zamenhof ŝajne ne bone komprenis la necesecon de verba-substantivo kaj tiam „-ad“ signifis nur la kontinuadon de ago, sed poste la praktika bezono aldonis la plilarĝigon kaj specialigon de la formo „-ado“, kiu ni konstante trovas en F. K. Ĉu ne estus profite al Esperanto, kompletigi la procedon kaj doni praktikan gerundion?

J. E. Bauman, St. Louis.